

bulteno

**DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA
ĈE KULTURCENTRO DE ONV PRAHA 1**

junio 1961

N-ro 60

12.4.1961

(Al Jurij Aleksejeviĉ Gagarin)

La tago lajnls tute ordinara,
kiam matene al labor' mi paŝis,
kaj tamen ĝi gravedis je la rara,
kion post kelkaj horoj ĝi malkaŝis.

Por foj' unua povis hom' terano
de hejma astro levi sin aŭdace,
forsvingi sin per sia mens' kaj mano,
laŭ olda rev' vojaĝi kosmospace.

Ĝi estas eventego el plej gloraj,
kiujn la hom' sukcesis realigi.
Memoros vin futurepokoĵ foraj,
tag', kiam spacon venis hom' maldigi.
Eble homaro estos svarm' abela
aliplanede foje ekloĝanta, kaj fakt' fariĝos olda mit'abela
per kosmoŝip anstataŭ tur' giganta.

Eble feliĉ' ne foras en la spaco,
sed eble kuŝas ie en proksimo
par la homar' vivonta en la paco
sen maljusteoo, sen perfort' kaj timo.

Ne vanos ja la penoj de la homo, eĉ se eden' ne sur alia stelo
atendus nin. Valoros la ekkono
por homa viv' sur nia olda Tero.
Jiří Kořínek

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 1 Ve Smečkách
26, je la 20-a horo.

VIENO - ESPERO PRI TUTMONDA PACO

Pli ol 1200 ĵurnalistoj el la tuta mondo atestas eksterordinaran intereson de la mondpubliko pri la unua renkontiĝo Ĥruŝĉov-Kennedy en la "belulino sur Danubo". Certe ne temas pri politika konferenco. De la 3-a ĝis la 4-a de junio oni apenaŭ povos deklari sian ĝeneralan opinion pri ĉefaj problemoj de internacia kunvivado, tiel danĝerigita per imperiismaj tendencoj dum lastaj monatoj. Tamen la signifo de tiu ĉi nekutime rapide konsentita renkonto estas gravega. Ne pro tio, ke oni atendus ian ŝanĝon aŭ reciprokan alproksimiĝon de tute diversaj opinioj. Neniu ja povas imagi al si, ke la usona prezidento cedos de la danĝeraj principoj de nuntempa politiko de sia registaro. Ĥruŝĉov estas malnova pac-batalanto; certe li dum interparoloj kun la prezidento rememoros aliajn renkontojn, tiujn kun miloj da ordinaraj

usonaj "strathomoj" dum sia fama vojaĝo tra Usono en la jaro 1958. Kiom foje ekde tiu ĉi famiĝinta vizito la samaj homoj, kiuj mansvingis al ridetanta duopo de statestroj, staris ĝuste je la rando de abismo de monda katastrofo, dank' al malgranda societo de milionuloj kaj generaloj, kiuj antaŭsentas sian neeviteblan foriron el la scenejo. Tiuj homoj jam militservus en la tria mondmilito, se ne ekzistus feliĉe la granda materia kaj morala potenco de socialisma mondsistemo, kreskanta de tago al tago. Anstataŭ tio ili, same kiel ni, trankvile sidos en siaj hejmoj apud siaj televidaj aparatoj, kune kun siaj infanoj, nememorantaj la lastan mondmiliton. Al infano similas Usono, neniam spertinta tragedion de moderna milito sur sia propra teritorio, ludanta kun terura armilaro. S-ro Kennedy estas nova homo sur granda politika scenejo. Li povas, per graveco de sia ofico, helpi al siaj ordinaraj samlandanoj, al tiuj, kiuj elektis lin kun espero pri celkonscia prudenta politiko. Nikita Sergejevic, malnova, sperta pacbatalanto, vin sekvas al la viena salono milionoblaj pensoj de la tuta homaro, sopiranta je vivo, feliĉo, paco. jmh

OMAGĜE AL 40-JARA JUBILEO DE KOMUNISTA PARTIO DE ĈEĤOSLOVAKIO
eldonos Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato kaj Esperantista klubo en Praha malgrandan antologion de ĉeĥa kaj slovaka poezio kaj prozo. Broŝurita verketo aperos verŝajne dum oktobro 1961 kaj estos mendebla ĉe Esperantista klubo en Praha, Týnská ulice 5, Praha 1, Staré Město.

SALUTO EL HUNGARIO

Okaze de la ŝtata vizito de kamarado A. Novotný en Hungario, la Esperanto-grupo "Konkordo" el Budapeŝto sendis al nia klubo salutleteron, kiun ni represas:

AL LA ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ!

Budapeŝto, la 27-an de februaro 1961

Karaj samideanoj!

La vizito de via prezidento kamarado Antonín Novotný estis vere triumfo en nia lando kaj atesto pri sincera amikeco inter la najbaraj popoloj. Kiel li mem esprimis kaj ankaŭ nia kamarado Kádár: ni kune laboras por la socialismo, por la paco kaj inter ni la limoj ne estas bariloj, sed kunligiloj.

En tiu senco laboras ankaŭ esperantistoj kaj ni petas vin, je okazo de tiu festo de ĉeĥoslovaka-hungara amikeco, akceptu por la esperantistaro de via stato niajn plej bonajn dezirojn por plua progreso, por sukcesa komuna laboro kultura, ekonomia kaj por la paco!

Kun varmaj amikaj salutoj

"KONKORDO" ESPERANTO-GRUPO de la Hungara Esperanto-Asocio

Sekvas 32 subskriboj.

KLARIGOJ al la poemo sur la 1-a paĝo de J. Kořínek, kiun ni represas el Heroldo n-ro 7/1961:

FUTURO = estonteco;

OLDA = maljuna, malnova.

FESTSALUTO DE POETO

En sia poŝtkarta bondeziro al sinjorino Šupichová pridonacis nin nia konata soveta poeto per tiu ĉi bela saluto:

Plej bela fest'- Unua Tag' de Majo!

Ĝi estas festo de Natur' kaj Kreo,

en tiu tago ĉie regas gajo!

En urbo, en vilag', sur kajo - solenas ĉie nia Pacarmeo!

G. Deŝkin

EN MOSKVO ONI BONE LABORAS

Centra Kulturdomo de medicinistoj en Moskvo eldonis dulingve /esperante-ruse/ presitan invitilon kun programo de prelegoj, farataj en la unua duonjaro 1961 de Universala Medicina Esperanto-Asocio, Esperanto-sekcio ĉe la Centra Kulturdomo de medicinistoj.

En la programo ni legas konatajn nomojn, kiel ekz. de d-ro Eug. Salnikov, d-ro Lavrentiev, prof. Bokarev kaj ankaŭ N. Rytjkov.

La Esperanto-sekcio _kunvenas ĉiu-merkrede kaj ĉiudimanĉe de la 19-a ĝis la 20-a horo. Dum la kunvenoj dimanĉe funkciadas ekspozicio, legejo, konsultado pri esperantaj tradukoj kaj verkado de E-literaturo.

Merkredaj kunvenoj estas rezervataj al rondetlecionoj, renkontiĝoj kaj interparoloj.

En kadro de la sekcio funkcias ankaŭ la junulara grupo "Fajrero", kun kiu ni jam delonge bone kontaktas.

G R A V A A T E N T I G O !

ESPERANTO EN LA ĈEĤOSLOVAKA RADIO.

La 6-an de julio 1961 okazos je radiostacio /Praha II-233,3m-L286kHz/ en kadro de disaŭdiĝo por Aŭstrujo /germanlingve/ relacio pri kaj en Esperanto - post jaroj la unua E-elsendo el Ĉeĥoslovakio eksterlanden. Ne forgesu do la 6-an de julio inter 18,15 ĝis 18,55. Stalinova 12, Praha 2.

GOTTWALDOV: Esperanto-kurso por komencantoj, kiu fakte finiĝis en marto, estis plilongigita pro granda intereso de ĝiaj vizitantoj. Estas ĝoje konstati tion kaj gratulinde al la kursgvidantoj, kiuj lerte metis en la programon de la kurso ankaŭ projekciadon de filmoj kaj lumbildoj el esperantista vivo.

EKSPOZICIO EN KOLÍN

En tagoj 23-26-an de marto la esperantista rondeto en Kolín aranĝis ekspozicion de infandeseĝnaĵoj el 12 landoj, kiun jam kelke da samideanoj el Praha vidis en Poděbrady. Tiu ĉi en Kolín estis kompletigita per fotografaĵoj, bildkartoj, leteroj kaj revuoj el tuta mondo. La nombro de vizitantoj estis surprizige alta. Dum komuna tagmanĝo en kafejo Volha oni konstatis, ke partoprenis samideanoj el plej diversaj lokoj, kiel el Čelákovice Praha, Poděbrady, Pardubice, Ostrava ktp. Post la kunveno la gastojn tra la urbo lerte gvidis samideano Miloš Němec kaj ofte funkciis la fotoaparatoj celantaj kapti grupiĝintajn samideanojn antaŭ plej rimarkindaj monumentaĵoj.

SOMERA PORPACA ESPERANTO-KOLEGIO en Trenčianske Teplice /ĈSSR/

Ekde la 16-a ĝis la 26-a de aŭgusto 1961 okazos en la mondfama kontraŭraŭmatisma banloko Trenčianske Teplice /ĈSSR-Slovakio/ Somera porpaca Esperanto-kolegio kun internacia partopreno.

En ĝia kadro estos aranĝitaj kursoj por infanoj, komencantoj, progresintoj, Esp. instruistoj kaj tradukistoj. La nombro de partoprenantoj ne estas limigita.

La programo de SPEK estas tiel dividita:

Antaŭtagmeze instruado kaj prelegoj, posttagmeze laŭ gusto ekskursoj, banado, tenisludo, volejbalo, ebleco de kuracado je reduktitaj prezoj, vespere amuzado en vastaj ejoj de moderna sidejo de SPEK /Domo de la Kanthoro de slovakaj instruistoj/.

Manĝaĵo. 5-foje potaĝo. Fervojobato en ĈSSR.

Detalajn informojn petu senprokraste ĉe: MESTSKÝ DOM KULTÚRY A OSVETY /Urba kleriga domo/ Bratislava, Suché Mýto 17, ĈSSR-Slovakio.

La entuta restado kostos Kčs 350,- /proksimume/, numero de la postpagilo: ŠBČS-Mesto 770-3282, fako Esperanto.

Venu pasigi la parton de via libertempo en agrabla medio!

4

ESPERANTO-POŜTMARKOJ

En la 9-a numero de grava filatelista revuo "Filatelie" aperis 2 1/2- paĝa artikolo "Esperanto sur „poŝtmarkoj", kiu en la nuna tempo ŝajnas esti la plej detala kaj kompleta priskribo de ĉiuj, ĝis nun eldonitaj Esperanto-poŝtmarkoj.

Jam pli frue, antaŭ ol mi sukcesis publikigi ĉi tiun artikolon, demandis min multaj esperantistoj en- kaj eksterlandaj, kiom da Esp. poŝtmarkoj ekzistas, ĉu estas eble trovi ĉiujn, ĉu mi povus al ili helpi ktp. al ĉiuj tiuj esperantistoj ĉeĥoslovakaj donas respondon la menciita artikolo /domaĝe, ke ne ĉiuj havas la feliĉon ĉi tiun numeron al si havigi pro tre limigita eldonkvanto/; al ĉiuj ceteraj mi povas ĉi tie doni ĝojigan " informon, ke la artikolo, iom reverkita, verŝajne aperos en Esperanto kiel memstara broŝuro kun fotografiaĵoj de ĉiuj Esperanto-poŝtmarkoj. Kvankam la eldono renkontas multajn malfacilaĵojn, tamen la broŝuro verŝajne aperos post iom da tempo. Poŝtkartoj kun instigoj pri eldono estas dezirataj, ĉar ili povas plirapidigi kaj efektiviigi la eldonon. Skribu al la adreso "Kroužek esperantistů při ZVIL „Plzeň, Kopeckého sady 13, Plzeň"

Ĉu estas eble akiri ĉiujn poŝtmarkojn? Malfacila respondo. La sukceso dependas de ĉiu unuopulo, kiel fervore li ilin serĉas. La kolektado de poŝtmarkoj ĉiam postulas tempon kaj monon - kaj tio validas duoble, por ĉi tiu kolekto: ne forgesu, ke ĉi tiujn poŝtmarkojn kolektas filatelistoj, sed krome granda nombro da nefilatelistoj -esperantistoj. Krome, kelkaj el ĉi tiuj poŝtmarkoj estas eldonataj en tre limigita kvanto /precipe jugoslava 300 Din. kaj ambaŭ triestaj, sekve ili estas tre multekostaj - kaj kiel la situacio montras, ĉe ni ne troveblaj - aŭ sole hazarde. Tio signifas, ke estas necese serĉi ilin en eksterlando, kaj tio postulas vastan / sed ne ĉiam/ korespondadon.

Nepre mi ne volas fortimigi tiun, kiu volas komenci ĉi tiun kolekton - male! Se mi parolas pri malfacilaĵoj, tio ankoraŭ ne signifas, ke la malfacilaĵoj ne estas venkeblaj. Mi mem komencis la kolektadon antaŭ pli ol unu jaro, do la tempo ne tre longa, kaj hodiaŭ mi havas jam ĉiujn tiujn poŝtmarkojn krom unu. Mi uzas la okazon kaj demandas esperantistojn, ĉu iu el ili ne povus la poŝtmarkon al ni sendi kontraŭ rekompenco, por ke mi fine havu la kolekton kompleta. Temas pri la rusa poŝtmarko kun bildo de Popov, 1927, valoro 7 kop. ruĝe surpresita je 8 kop. - sed atentu! La cifero "8" estas presita renverse. /Numero de pm. laŭ Zumstein: 344a./

Estantaj kolektantoj, ne timigu vin jenaj vortoj: certe ekzistas nur malmultaj kolektantoj, kies kolekto da Esperanto-poŝtmarkoj estas kompleta. Mi scias pri neniu tia - kvankam kelkaj iam skribas, ke ili posedas ĉiujn tiujn poŝtmarkojn, tamen fine montriĝas, ke pri tiu aŭ alia poŝtmarko ili ne sciis. Ĉu ekzistas en Ĉeĥoslovakujo kolektanto-esperantisto, kiu havas ĉiujn ĉi tiujn poŝtmarkojn?

Eble ĝuste la supre menciitaj malfacilaĵoj allogas novajn kaj novajn kolektantojn. Ĉu miro? Se ili sukcesos gajni ĉiujn tiujn poŝtmarkojn, ili havas duoblan profitojn - kompleta kolekto da poŝtmarkoj estas ĉiam pli valora ol poŝtmarkoj unuopaj, kaj due, ili posedos gravan dokumenton pri oficiala rekono de Esperanto. Tial ne timu kaj ekkolektu!

/Por "Bulteno" de EKP verkis V. Váňa./

INTERNATIONAL NEWS LETTER /Internacia novaĵ-letero/ aperigita de»SAT en Ilford /Britujo/, No 51, aprilo 1961.

Anglalingva sciigo pri nia biblioteko en Týnská strato ĉe "Nigra Elefanto"; mencio pri ties savo dum naciista okupacio. Krome omaĝa noto pri la mortinta episkopo-esperantisto D-ro A. Eltschkner kaj lia emblemo kun Esperanto-stelo. Ambaŭ sciigoj devenas de nia Bulteno. INL estas aldono al "The Worker Esperantist" - eble nun iom ŝanĝinta sian opinion pri situo de E-movado en ĈSSR.

La 5-an de aprilo Esperantistan klubon en Praha vizitis dana ĵurnalisto J. Vesterland Andersen, kiu tre interese raportis pri siaj neforgeseblaj impresoj el restado en Praha kaj speciale entuziasmiĝis pri nia folkloro, kiun li propraokule povis studi dum entreprenita vojaĝo al Mo-

ravio. Dum la kunveno multaj samideanoj lin demandis pri diferenco inter la nia kaj lialanda vivmanieroj. Jam venis unuaj salutkartoj de li el Danlando.

5

Jaroslav Hlaváček LA KASTEL-ĜARDENOJ EN ERAHA

Turhorloĝo de la katedralo batsonas. Ĝia profunda baritono resonas inter palacoj kaj turoj kastelaj en antaŭurbo Hradčany, ĝis kiamĝi perdiĝos ie en zigzago de stratetoj.

Ni troviĝas en la ĝardeno senpere sub impona muraro kastela de Hradčany. Antaŭ jarcentoj ĉio aspektis alie; ĉi tie ekzistis tiam nur krutaĵa deklivo etendiĝanta desub kastel-muraro malsupren al ĝardenoj kaj palacoj en la kvartalo "Malá Strana".

Post la unua mondmilito arkitekto Jozip Plečnik estris rekonstruadon de Praha-kastelo.

Precipe en "Rajská"/Paradiza/ ĝardeno li postlasis karakterizajn postsignojn de sia laboro.

Ni eniru el kulminaĵo de „Nové Zámecké schody" /Nova kastela ŝtuparo/. Sur larĝa ŝtuparo ni malsupreniĝas al rondforma granit-fontano, situanta en verda herborica spaco, jam per dimensio majkaŝanta sian pezegon: 40 tunojn pezas ĉi tiu koloso.

Ni flankeniĝas sur freŝe sabloŝutitaj vojoj al fortukaĵa kastelmuro, al Matias-altano el jaro 1614, rond-konstruaĵo en murego. Ni rigardas vandpentraĵparojn ornamitajn de Josef Navrátil, kaj belegan lignoplafonon 39 landemblemoj de Matias-imperio. De ĉi tie sonadis la fanfaroj omaĝe al proksimiĝantaj vizitantoj same kiel bruegaj trumpetoj dum grandaj festoj.

La arkitekturo de Plečnik ankoraŭ kelkfoje vidiĝas en apuda ĝardeno "Na Valech" /Sur remparo/ en la bela portiko nomata Bellevue ĉe la svelta pilastro kun jonia kapitelo, sur kiu brilas orumita globo kun fulmoj celantaj ripozallogan Moravan bastionon, kies altaneto estas kreskaĵkovrita per ampelopso, kaj kie simpla ŝtontablo invitas por enpeniĝi. De el-rigardaltano ni iras, al ŝtuparejo, tra kiu oni venas ĝis tria kastelplaco. Allogas nin eĉ la muzikpavilono, elipsoforma konstruaĵo, en malsupra kastelĝardeno limtuŝanta terasojn de palacoj en "Malá Strana".

Arboj, herbo-bedoj, floroj - kaj inter ili ĉarme noblaj arkitekturaĵoj invitantaj al ripozo, samkiel al rigardoj je Praha, kiu etendiĝas en larĝvasta panoramo. Ĝis kien oni vidas, elstaras alta ŝtonmasivo de palacoj.

Diverseco de vidaĵoj estas ĉarmorava. Neatendite oni jam atingis la terason apud "Staré Zámecké schody" /Malnova kastelŝtuparo/ kaj de tie "Daliborka", "Černá věž" /Dalibor kaj Nigra turojn/.

Troviĝante ĉi tie ni rigardu eĉ novajn terasojn sub la Nigra turo, aranĝitajn kiel miniaturaj ĝardenetoj kun elrigardo tiel belega, ke la spiro ekhaltas: jen vastega maro da arboj kaj verdaĵo, kaj en ĝi la reĝa somerkastelo nomata Belveder, la plej bela renesanca konstruaĵo tiaspeca en centra Eŭropo.

(Limo inter la ĝardenoj Lélteburga kaj Fuerstenberga) - Foto Pešina

Certe malmulte da tiel belaj ĝardenoj ekzistas ne sole en Praha, sed eĉ en aliaj urboj ĉi- kaj ekster-landaj. La kastel-ĝardenoj _ estas posedaĵo de la popolo. Preskaŭ ĉiutage oni vidas ŝanĝojn, estas rekonstruataj novaj objektoj, kompletigitaj per novaj artverkaĵoj, multloke estas malkovrataj nekonitaj memorindaĵoj. Tial estas kompreneble, ke multaj vizitintoj penas rekoni iujn Kastel-partojn kaj ekhaltas surprizitaj.

Oni kutimas promenvizitadi la kastelĝardenojn en momentoj festaj aŭ ĉiutagaj kaj admiru belaĵojn, kiujn jarcentoj konservadis, sed kiujn nia generacio altigas al nova, demokrata celo.

Esperantigis J. Cíková

AŬDAS LA TERO PATRINA

/Kanto de la unua kosmonaŭto/

Teksto de E. Dolmatovskij

Muziko de D. Ŝostakoviĉ

Aŭdas kaj scias
Tero patrina,
kie vi flugas en alto senfina.
Vin, ŝian filon,
Ame si gardas
Per la stelaro de muroj de Kremlo,
Turoj de Kremlo .
Zorge vin ĉiam rigardas.

Aŭdas kaj scias Tero patrina,
Ke malfacilas la lukto obstina,
Sed vi obstaklojn Rompas sen laco,
Ĉar si par nobla afero vin sendas.
Ĉar vi defendas Sanktan aferon de paco!

Aŭdas kaj scias
Tero patrina,
Ke vi renkontas sur vojo senfina
Nubojn kaj fulmojn.
Sed en kurado
Tra la tempesto de tondro kaj vento
Venos kun venko Al via cel', kamarado!

Elrusigis K.Gusev

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST en sia n-ro 100 raportas pri malfermo de Esperanto-Domo en Sydney. La 17-an de decembro 1960 la unuan fojon sub propra tegmento kunvenis tieaj esperantistoj. La domo sin ne konstruis mem, kompreneble, sango, ŝvito, larmoj, laborado, klopodegoj, kaj ĉio por Esperanto necesa estis donita kaj daŭre estas alportata. Kaj la rezulto bela "Esperanto house" en Sydney.

HEROLDO de ESPERANTO: en numero 1 /1315/ ni trovas belan poemon verkitan de nia poeto Jiří Kořínek, omaĝe al Julio Baghy, kiu atingis 70 jarojn de sia vivo. En la sama numero troviĝas poemo "Meditado super Esperantista poŝkalendaro" de nia poeto Karolo Píc. Plie en la sama numero ni trovas bildeton el la vizito de reprezentantoj de Esperantista Klubo en Praha ĉe nia honora membro Rudolf Hromada okaze de 70-a datreveno de lia naskiĝtago. Heroldo n-ro 1316 recenzas poemaron "Nur tri kolorojn" de nia membrino Eli Urbanová. La libro aperis ĉe Stafeto en Kanariaj insuloj. Heroldo n-ro 1320 favore recenzas Junularan kantareton de J.Cink, eldonitan en Ostrava-Poruba.

"LEONTODO", organo de Esperanto-Ligo en Hokkaido /Japanujo/ en sia n-ro 23-24 represas kelkajn leterojn de ĉeĥaj esperantistoj.

HEROLDO n-ro 4/1961 en artikolo de Bruno Vogelmann "Centra tutmonda kolektado de sciencaj informoj kaj la problemo de internacia lingvo" estis skribite inter alie:
"Sendube la laboro de Siu scienculo en la mondo estus multe pli facila kaj fruktodona, kaj sukcesus pli rapide, se ĉiuj sciencaj publikaĵoj el la tuta mondo ĉiumomente estus haveblaj por li. Li tial povas envii la scienculojn de Sovet-Unio, kiuj havas je ŝia dispono la Instituton por Kolektado de Sciencaj Informoj el Eksterlando, bone servantan al ili. 2100 oficistoj kaj 20.000 okazaj sciencaj kunlaborantoj densigas ĉiujn artikolojn el 12.000 sciencaj gazetoj, same el 8000 raportoj pri sciencaj konferencoj kaj kongresoj, je amplekso de dek ĝis tridek

linioj. Ĉiun duan semajnon estas presata po unu volumo da tiaj resumoj de eksterlandaj laboroj en ĉiu el la 16 sciencaj fakoj /fiziko, kemio, biologio ktp./ kaj sendataj al la scienculoj de la koncernaj sciencaj fakoj en la tuta Sovet-unio. Ĉiu volumo nombras 600-700 paĝojn.

Paradokse estas, ke usonaj sciencaj institutoj abonis la dusemajnajn volumojn de la soveta instituto, por ekscii el Moskvo, kion oni povas legi en anglaj fakaj gazetoj. Moskvo kompreneble rifuzis la peton eldoni anglajn tradukojn de la informoj. Tial oni devas la ruslingvajn resumojn retraduki anglan!

Estas tute klare, ke la starigo de Centra Tutmonda Instituto por Kolektado de Sciencaj Informoj estas tuja nepra neceso.

Estas tasko de l'esperantistoj kaj de la Esperanto-organizaĵoj, antaŭen pusi la ideon de tia Centra Tutmonda Instituto por Kolektado de Sciencaj Informoj kun la uzo de Internacia Lingvo. Mi petas precipe ĉiujn scienculojn el la esperantistaroj postuli en siaj gazetoj, en konferencoj kaj kunvenoj la fondon de tia mond-instituto por scienca informado per Esperanto."

JUBILEA MEDAJLONO PRI JELĈ

Kredu au ne kredu - JOZEFO VÍTEK iĝas la 29-an de majo t. j. kvindek-jara! Jes - JELĈ - Jozefo el Ĉeĥoslovakio - kiel oni lin konas en Skandinavio kaj aliaj, landoj abrahamigis kaj tiu fakto kaŭzas, ke ni, la redakcio de Bulteno, rememoras tiun gravan vivjubileon de nia ŝatata amiko, nun ne plu loĝanta en Praha, sed iom pli norde, en distrikta urbo Mělník. Hodiaŭ ni ne volas skribi detale pri lia ĝisnuna vivo ĝenerale, kvankam el diversaj vidpunktoj kuregis, kiel esperantisto, ĉar nur sur tiu vojo li postlasis profundajn postsignojn de nia por-kaj per- esperanta laboro.

Kun Esperanto li konatigis jam kiel studento, do antaŭ pli ol tridek jaroj. Dekomence li direktis sian plenan atenton al Svedujo, kiu poste fariĝis lia preferata kaj adorata lando. Kaj ne nur Svedujo. Tuta Skandinavio ekkaptis lian koron, li ekamis ĝin tiel forte, kiel oni amas sian propran patrujon. Korespondado kaj vizitoj de svedaj amikoj en lia hejmo, lia unua vojaĝo al Svedujo forĝis firmajn ligilojn kaj simpatiojn al tiu norda lando, nerealigeblaj sen uzo de lingvo Zamenhofa. Sekvis jaroj de diversaj laboroj por disvastigo de Esperanto: kursoj, prelegoj, vojaĝoj, instruado en Parizo. Entute sumo da laboro, persisto, obstino, fervoro kaj amo, diligenteco kaj talento - jes, tio ĉio kune reprezentas nian jubileanton. Lia dua vojaĝo al Skandinavio daŭris tri monatojn. Ĝi fariĝis grava mejloŝtono en la vivo de nia samideano. Preskaŭ 90 prelegoj pri Ĉeĥoslovakio konatigis tiam milojn da geamikoj pri nia lando, pri la vera. Kalvario de nia popolo dum la faŝista okupado, pri ĝia heroa batalo kontraŭ subpremantoj kaj pri la fina glora venko. Jozefo Vítek kaj liaj esperantlingvaj prelegoj ĉie triumfis. Lia senpera, gaja konduto kaj serioza laboro vekis admiron kaj entuziasman aplaŭdon. En siaj prelegoj li ĉiam instigis al pli vasta mondkompreno, pli forta ligiteco al nia lingvo kaj pere de ĝi al reciproka estimo de naciaj kulturoj. En tia laboro manifestiĝis ankaŭ idealoj de moderna homo daŭre strebanta al celo pli nobla, ĉiam pli alta, al socialismo. Vítek, homo ekflamiĝema, sed profunde delikatsenta, neniam forkuradis de taskoj, kiuj laŭ li povis grave helpi al la movado. Tial li senhezite transprenis ankaŭ la redaktadon de nia Bulteno. Modesta ĝi estis en la komenco. Sed Vítek, la redaktoro, artikolskribinto, tajpisto, persisto kaj distribuinto, sola aŭ preskaŭ sola, apud siaj profesiaj kaj familiaj laboroj sukcesis aldoni 50 numerojn de nia kluba gazeto, kiu fariĝis mondkonata. Krom tio li tiam funkciis kiel prezidanto de Tutŝtata Esp.-organizo, li vojaĝis tra nia tuta lando kiel prelegisto. Centojn da lokoj li vizitis. Certe li estas unusola esperantisto ĉe ĝi, kiu konas persone la plej multajn ĉeĥoslovakajn uzantojn de lingvo internacia. En Doksy apud Máchalago li dum jaroj funkciis kiel instruisto kaj sekretario de la famaj Someraj Esp.-Kolegioj, kies kunfondinto li estas.

Kara Jozefo, nur parte kaj senorde mi skizis vian esperantistan portreton okaze de via vivjubileo. Kiel iama redaktoro de la Bulteno vi bone scias, ke en gazetoj ĉiam mankas la

necesa spaco par longaj artikoloj. Tial pardonu, se mi finas. Estu vi kaj via ŝatata familio sana kaj permesu, ke mi kaj ni ĉiuj enpense premu vian manon, kiel esprimon de nia granda danko pro modela laboro de vi ferita al la Esperantista Klubo en Praha kaj al la Esperanto-movado entute!

Dolfa Bartošík

8

František Polanský:

COMENIUSTAGOJ ĈIUTAGE

Eksterordinara evento de ĉeĥoslovakaj pedagogiaj scienco kaj lernejaroj estas "Comenius-tagoj en Uherský Brod, ĉiujara kongreso de ĉeĥoslovakaj instruistoj de pedagogia scienco kaj lernejadministracio. Ili renkontiĝas en moravia urbo Uherský Brod, en ĉarma naskiĝregiono de Jan Amos Komenský, la "instruisto de nacioj" kaj tradicie konsiliĝas dum sep tagoj komence de la libertempo.

La enhavo de ĉi tiuj "tagoj" estas tre riĉa: antaŭ ĉio viviĝas la memoro kaj ideo de Comenius, la fondinto de scienca edukistemo; ĉiuj ĉeestantoj kutimas pilgrimsekvi tra loĝlokoj de lia netrankvila junaĝo, kiun li pasigis en tiu ĉi subkarpata regiono. Propra kerno de la kongreso estas prelegoj kaj diskutoj pri bazaj demandoj en la teorio kaj praktiko de samtempa pedagogio kaj lernej-evoluoj en ĈSSR.

La ĉefreferaton lastjare "Por lernejo pli proksime al la vivo!" prelegis ministro de instruado kaj kulturo d-ro František Kahuda. Poste prelegis universitataj docentoj, laboraroj de pedagogiaj eksperimentinstitutoj kaj reprezentantoj de lerneja sindikata organizaĵo.

La fakaj sekcioj, en la plej pretendema pedagogie-literatura konkurso, oni prelegas libervolajn disertaĵojn el ĉiuspecaj lernejoj. Motivojn por disertaĵojn la instruistoj elektas el sia ĉiutaga praktiko por solvi gravajn problemojn el pedagogio, didaktiko, morala kaj estetika edukoj, por prijuĝi rezultojn kaj kvalifik-manieron, novajn metodojn en instruado, en politekniko ktp. La elektitan temon la instruisto prilaboras tutan jaron kaj eĉ pli longtempe. Poste li ĝin prezentas en konkurso, devas sukcesi en konkursoj distrikta, regiona kaj nur tiam li eniras la centran ekzamenan rondon por Comenius-tagoj en Uherský Brod. Mi mencias almenaŭ kelkajn temojn de lasttempaj disertaĵoj: La teatro kaj filmo dum eduko en infanvartejoj. Ideoj noetikaj de Komenský. Angulo de vivanta naturo dum biologia instruado. Homfiguro en pentrarto. Metodoj ekzamenaj en matematiko. Influo de la korpeduko je karaktero de lernanto. La sent-eduko de maturiĝanta junularo. Pedagogie-didaktikaj problemoj ĉe balbutemaj infanoj. Kiel la muzikohelpas ĉe eduk-laboro?

Ministerio de instruado kaj kulturo kaj la publiko en ĈSSR alte aprezas ĉi tiujn scienclaborojn de instruistoj – la aŭtoroj de la disertaĵoj estas rekompencataj materie kaj iliaj ellaboraĵojn oni publikas en pedagogia ĵurnalaro. Sed plej granda valoro de la disertaĵoj konsistas en tio, ke ili prezentas noblan konkuradon, montrantan al alian vojon, kiel atingi eble plej bonajn rezultojn en edukado kaj instruado. La sperto de iniciativaj instruistoj tiuforme transiras al ĉiuj aliaj kolegoj, servante tiel al plibonigo de instruada praktiko ĉe la junularo en ĈSSR.

Ekstera kompletigo kutime estas ekspozicioj pri la pedagogia literaturo, novaj lernejinstruiloj, infanliteraturo, laboraĵoj de lernantoj – dum ĉeesto de reĝisoroj kaj filmistoj oni projekcias novajn lernaj-filmojn. pri kies kvalito la instruistoj kaj filmkreatoj diskutas – oni aŭdigas gramofondiskojn, distinitajn por la lernejo, aranĝas koncertojn de grandaj korpusoj ktp. Ĝis nun la „Comenius-tagojn“ ĉeestadis nur pedagogoj el Ĉeĥoslovakio. En plej proksimaj jaroj al aktiva partopreno estos invitataj ankaŭ la pedagogoj eksterlandaj.

Esperantigis Jana Cíhová

Nigra eleganto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo – J- Ŝustr

Ni daŭrigu hodiaŭ denove nian promenadon tra la ĉirkaŭaĵo de "Nigra Elefanto". Ni eliru el la Biblioteko de Esperantista Klubo en Praha, kiu troviĝas en la strato Týnská n-ro 3, kaj turnu nin maldekstren! De la paŝado ni certe ne laciĝos, ĉar jam post 15-20 paŝoj haltigos nin rava bildo, kiu malfermiĝis antaŭ ni: La domoj, pitoreske grupigitaj, formas miniaturan placeton

vere vidindan. Ĉi tie nia strato fendiĝas en tri direktojn: Akre ĝi turniĝas dekstren, ĉirkaŭante la gotikstilan preĝejon de Dipatrino, por veni al la stratoj Štupartská kaj Celetná. Rekten ĝi daŭrigas sian vojon, sovante sin tra la trairejo de antikva palaco. Estas palaco Granovski, sub kies volbaĵo la strato ricevas la nomon "Týn" aŭ "Týnský dvůr" /kortego de Týn/. Fine la plej maldekstra branĉo de nia strato subiras malnovan domon kaj rapidas al la strato Masná. Kiel stranga estas tiu domo, tra kiu nia strato iras. Ĉe sia dekstra flanko en la teretaĝo ĝi tute ne havas muron! Kaj tamen ĝi staras solide: Ĝi apogas sin je "Ora Ringo". "Ora Ringo" estas nomo de la domo najbara. Kaj ĉiuj ĉi domoj, la "Nigra Cervo", la domo de Václav Budovec z Budova, la "Ora Ringo", la palaco Granovski kaj "Ungeld", formas tiel pitoreskan scenejon, ke lerta reĝisoro ne povus elpensi pli kuriozan, por prezenti scenon el mezepoka urbo. Ni ne povas satiĝi je tiu ĉi bildo. Somere kiel vintre, printempe „kiel aŭtune, ĉiutage vi povas trovi ĉi tie artistojn, kiuj en sian skizlibron, aŭ sur tolon eternigas tiun antikvan belaĵon. La samon faras turistoj kaj hazardaj vizitantoj, sed tiuj estas pli rapidaj. Per siaj kameroj ili kapablas multe pli rapide fari ne unu, sed multajn bildojn.

Tiu branĉo de nia strato, kiu iras rekten, trairas la palacon Granovski, kaj venigas nin al placo iom pli vasta ol la antaŭa. Ĝi troviĝas en "Týn". Tiu antikva ĉeĥa nomo / signifas "loko fortikigita". Tia ĝi vere estis. Jam antaŭ multaj jarcentoj ekzistis ĉi tie fortikigita foirejo kaj vardeponejo por eksterlandaj komercistoj, kiuj post pago de imposto ekspoziciis ĉi tie siajn riĉaĵojn por vendi aŭ ŝanĝi ilin je varo alia. Ĉi tiu loko funkciis do kiel internacia komercejo aŭ foirejo jam en la komenca historio de Praha. Praha tiam kuŝis sur la krucvojo inter nordo kaj sudo, okcidento kaj oriento, kaj la trafiko estis ĉi tie sufiĉe granda. La foirejo estis ĉirkaŭita per fortikaj muroj, konstruitaj el dikaj traboj. Sed poste, la ŝtono kiel konstrumaterialo ĉiam pli kaj pli uzata, anstatauigis lignajn barojn. Kelkaj restaĵoj de ili estas ankoraŭ nun bone konstateblaj, kun siaj tipaj mallarĝaj romanikaj fenestretoj. Tiuj muroj ekestis antaŭ mil aŭ 1100 jaroj. Eble eĉ pli frue, ĉar jam en la naŭa kaj deka jarcentoj staris ĉi tie domoj konstruitaj el ŝtono. Bonkvalita ŝtono estis minata ĉe okcidenta limo de la urbo en granda kvanto, kaj tial ĉiu sopiris havi domon ŝtonan, domon, kiu ne forbrulas, kaj estas pli daŭra ol domo ligna. Dokumentojn pri tio ni povas ĉi tie en la ĉirkaŭaĵo ĉie vidi. Nia domo, la "Nigra Elefanto", estas nenia escepto inter ili. Sufiĉas iri malsupren en la kelon de kiu ajn el la malnovaj domoj. Ĉie ni trovas romanikajn restaĵojn de la domoj, kiuj samloke staris antaŭ la domoj nunaj, jam antaŭ multaj jarcentoj. Tio estas dokumentoj el ŝtono! Sed ekzistas ankaŭ kelkaj dokumentoj sur pergameno skribitaj, kiuj parolas pri longega kaj malnova historio de ĉi tiu loko! Ni citu nur du: En la kapitula biblioteko estas konservata dekreto, de la ĉena reĝo, Venceslao la Dua. En ĝi, la 24-an de aŭgusto 1298 ĉi tiu seĝo deklaras la foirkorton "Týn" en Malnova Urbo de Praha liberigita de ĉiuj impostoj kaj ŝarĝoj. - Alia dokumento ne estas en nia lando. Ĝi ankaŭ ne devenas de ĉeĥa fonto. Ĝi estas multe pli aĝa, skribita antaŭ plena jarmilo. Ĝia aŭtoro estas araba Hebreo Ibrahim ibn Jakub, kiu, en la deka jarcento dum siaj vojaĝoj tra multaj aŭropaj landoj vizitis Pragon, pri kiu li skribas, ke ĝi estas urbo, konstruita el ŝtono! Verŝajne li estis komercisto; li certe tiam ekloĝis ie proksime de loko, kie nun ni havas nian bibliotekon. Ĉi tie ja staris la plej multaj domoj konstruitaj el tiu blanka marmorŝtono de Břevnov aŭ Bílá Hora. En la fundamentoj, kaj en la keloj de ĉirkaŭaj domoj, ĉie ni trovas ĝin. La centro de la vivo, la arterio de la komerco en Praha antaŭ jarmilo pulsas ĉi tie. Ĉi tie certe Ibrahim ibn Jakub ĉerpis plejmulton el tiuj scioj pri Praha kaj pri la slavaj landoj, pri kiuj li skribis en sia raporto, kiu hodiaŭ estas la plej malnova skriba dokumento pri la ekzisto de Praha. /kiel urbo konstruita el ŝtono kaj kalko/...

Malantaŭ nia dorso postrigardas nin malbela "Nigra Elefanto". La pordo de nia biblioteko estas malfermita. Ni eniru, por tralegi tie parton de tio, kion Ibrahim ibn Jakub skribis antaŭ plena jarmilo, kaj kion en siaj tradukoj kaj verkoj konservis por nia nacio Ed. Kowalskij, J.Hrbek kaj aliaj.

/ La vorto "týn" devenas etimologie de samsignifa kelta vorto "dun", kun kiu estas parenca ankaŭ la hodiaŭa angla "town". Ĝi estas lingva memoraĵo pri keltaj centoj, kiuj en la jarcentoj antaŭ Kristo, loksidis en niaj landoj.

10

Samideano HEBKÝ

JUBILEAS KAJ REMEMORAS

Kvieta printempa vespero. Mi havas rendezuon kun s-ano JAROSLAV HEBKÝ, kiun mi telefone invitis. Li venas akurate /ĉiam preciza kiel en laboro/, ni iras kafejon kaj eksidas. La kafo bonodoras, nia esperanta parolo facile fluas.

Mi volas komenci pridemandadon, sed kiel? Kion demandi unue, pri kio speciale - liaj vojaĝ-aventuroj estas tiel riĉaj. Kutime oni vojaĝas per ia veturilo, sed s-ano Hebký faris inter- kontinentan vojaĝon perpiede kiel vera turisto.

Kiam vi naskiĝis, s-ano Hebký, estas mia mallerta demando.

Jes, tiel oni kutime komencas intervjuon, li bonhumore respondas. Nu, mi ne estas virino, do mi konfesos la agon. Mi naskiĝis la 15-an de februaro 1899 en Bunzendorf apud Frýdland /ĉe la landlimo/, do mi ĉi-jare atingis 72 jarojn. Mi estas laboristo, maŝinmekanikisto, nun kompreneble pensiumita.

Kie vi laboris?

En fabrikoj de Škoda. Mi estis sufiĉe kontenta, kvankam ofte estis malfacilaj tempoj por laboristoj, sed tio jam estas feliĉe malantaŭ mi.

Kiam, kiel kaj kial vi esperantiĝis?

Kiam? En jaro 1911.

Kiel? Mi estis ano de "Laborista akademio" en Praha. Ĝi havis turistan fakon ĉe kiu estis Esperanto-grupo. Kaj tie oni instruis Esperanton por socialismaj kaj turismaj propagandceloj. Kaj kial? El praktikaj motivoj. Mi estis aventurema kaj vojaĝema homo. Mi volis ekkoni mondon, lerni novajn labormetodojn ĉe mia metio, vidi en kiaj kondiĉoj vivas laboristoj en aliaj landoj.

Tiukaze miaj demandoj estus nesufiĉaj. Mi petas, rakontu! mi aŭdis, ke vian grandan vojaĝon vi faris piede!

Jes, kiel vera turisto mi "vojaĝis" piede por pliproksimiĝi al homoj kaj ankaŭ poŝtari la monon. Tiam oni ŝparis ĉiun heleron, veturado tiam estis lukso. Sed mi komencu de ia komenco. Mi sopiris vidi unue la Husujon. Sed mi devis al rekrutigo. Soldato mi ne fariĝis. Do la vojo al vojaĝo estis malfermita. Mi tuj iris demandi pasporton. Post unu semajno mi ĝin ricevis. Ĝi validis por ĉiuj eŭropaj kaj aziaj ŝtatoj. Mi devas rimarkigi, ke mi estis jam membro de UEA, do mi posedis Jarlibron. Nu, kaj post ricevo de pasporto mi tuj ekiris ekipita per necesaj, inter ili estis ankaŭ fotoaparato. Tio ĉi okazis post unu jaro de mia esperantiĝo, en jaro 1912. /Kiel rapide oni eklernas Esperanton!/ Enlande kaj en Germanujo mi uzis helpon de "herberg" tranoktejoj kaj manĝejoj. Tiel mi venis al dogana limstacio Wieruzsow. Tie, nekomprenante la lingvon oni forprenis de mi ĉiujn esperantaĵojn, inter ili estis socialismaj broŝuroj. Dum disputo mi iel feliĉe savis UEA jarlibron - adresojn de delegitoj mi bezonis al plua vojaĝo. La fotoaparaton oficisto enskribis en mian pasporton.

Estas multaj urboj kaj lokoj, kiujn mi trairis, Ŝirac, Pobianice, Warszawa, Grodno, Dvinsk, Paskov ktp., mia celo estis Peterburgo /nun Leningrad/. Tien mi venis kaj mi restis tie kiel laboristo en maŝinfabro. En Peterburgo mi renkontiĝis kun nia samideano d-ro Pitlík el Praha, kiu estis vojaĝanta tra la mondo, prelegante en Esperanto kun lumbildoj pri nia patrujo. Mi helpis al li aranĝi prelegojn en Peterburgo.

Sed mia sopiro kaj vagemo logis min al novaj vojoj. Mi iris al Samara, Stavropol kaj Abdulino en Samara gubernio. Krom mia profesia laboro mi multe laboris por Esperanto. Mi gvidis kursojn. En Abdulino mi fondis E-klubon. Tiam mi scipovis jam ruse. Ĉe la fino de la jaro 1913 mi ricevis forpermeson por viziti hejmon. Mi vizitis Česká Skalice, kaj Červený

Kostelec, tie mi konatiĝis kun nia verkistino s-anino Julie Šupicbová. En Praha mi renkontiĝis kun s-ano Kühnl, aŭtoro de E-lernolibro kaj vortaro. /Li fariĝis poste ambasadoro en Hispanujo./ Post libertempo revenante al Stavropol mi haltis en Varsovio. Kun tiea UEA-delegito s-ano Hirszowski mi vizitis nian majstron d-ron Zamenhof en lia loĝejo en Dzika strato. Pri kio vi interparolis?

Tiam en Praha estis iaj kvereletoj inter du E-societoj, ili ambaŭ plendis ĉe majstro. Li demandis min pri la afero. Sed nesciante, pri la motivoj kaj detaloj mi ne povis doni al li kontentigan respondon. La majstro montris al mi kolekton da donacoj de esperantistoj kaj E-kongresoj el la tuta mondo. Ĝi estis impona kaj kortuŝa. Li subskribis al mi kelkajn poŝtkartojn, de tiuj mi havas nur unu.

Kaj denove mi revenis al mia laboro en Stavropol. Venis mondmilito. Kiel eksterlandano-aŭstriano mi estis internigita kelkan tempon. Ĉar mi estas Ĉeĥo, oni lasis min labori en Samara. Dum tiu milita kaj revolucia tempo mi travojaĝis multon: Ufa, Zlatbrist, Ĉeljabinsk, Jekaterinburg, Omsk, Krasnojarsk, Irkutsk, Ĉita. Mi venis en Ĉinujon al Hajbar. Cieiko, Ĥarbin kaj denove reen.

En Nikolsk-Ussrijsk, en E-grupo, mi konatiĝis kun fama hungara E-Verkisto Julio Baghy. Li estis tie kiel militkaptito, gvidis tie E-kursojn, aranĝis program-vesperojn. Ni fotografiĝis kun E-societo /dum lia vizito en Praha antaŭ 3 jaroj mi donis al li, unu el tiuj fotografiaĵoj, li estis ĝoje surprizita/. Poste mi venis al Vladivostok. Tie estis ankaŭ multaj esperantistoj kaj E-klubo. Estas interese, ke mi tiam pli "bone parolis Esperanton ol gepatran lingvon, tiu estis jam influita de la rusa.

Kiel vi revenis hejmen?

Ne plu perpiede. Tio estis jam vojaĝo per vagonaroj kaj ŝipo. Mi venis tra Sinujo, Hindujo, Arabio, Egiptujo al Triesto. De tie mi venis en jaro 1920 al Praha. Kaj denove mi komencis la laboron. Ne nur profesian, sed ankaŭ poresperantan. Mi multon travivis, oni ne povas ĉion rakonti, ĉar ĝi estus libro, ne nura intervjuo.

Pri miaj vojaĝoj mi faris prelegojn en kluboj, gvidis kursojn kaj faris propagandon. Kvankam mi estas 72-jarulo, tamen mi ne perdis entuziasmon por Esperanto.

Mi regule vizitadas E-klubon, ke mia ĉeesto instigu la junullaron al laboro por Internacia Lingvo, kiu celas tutmondan pacon.

Dankon kaj multan ŝanon!

Ridetante adiaŭis min s-ano Hebký.

Intervjuis A. Slanina

Ĉeĥoslovakaj gazetoj pri esperanto

Semajna junulara revuo "MLADÝ SVĚT" /"Juna mondo"/ enpresis en la n-ro 18 -1961 informan artikolon pri Esperanto "Pri unu el la vojoj al amikeco kaj paco", verkita de J.Vondroušek.

"OCHRANNĚ ZNÁMKY", oficiala gazeto de Ofico por patentoj kaj inventoj /Praha/, n-ro 4/1961, enhavas oficialan registron de kombinita komerca marko /kvinpinta stelo kaj vorto "Esperanto"/ por ĉiuspecaj butonoj, zipoj k. similaj fabrikataj de nacia entrepreno Koh-i-noor en Praha.

Mencion pri Esperanto enpresis ankaŭ entreprena gazeto "SMÍCHOVSKÝ TATROVÁK" ESPERANTO-STRATOJ

En 1a landoj estas 127 stratoj aŭ placoj kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto.

MUZEO de H. C. ANDERSEN en Odense, Danlando, en sia Jarraporto por jaroj 959-1960 dankas al Esperantista Klubo en Praha por donaco de libro el verkaro de Andersen, kiu aperis en rusa traduko en Moskvo.

D-ro STANISLAV KAMARÝT

MEMUAROJ EL NIA ESPERANTO-MOVADO

(FRAGMENTO)

Fraŭlino Běla Krapková lernis Esperanton en jaroj 1889-90 de Lorenz en socialista kultura rondeto en Praha. "U Pštrosů", kie Lorenz organizis certe la unuan kurson de Esperanto por Ĉeĥoj. Tiam ŝi estis studentino en Pedagogia Instituto en Praha. Baldaŭ poste ŝi gvidis al distrikta prefekto en Smíchov ministrojn el Kladno, kiuj postulis pli bonajn laborkondiĉojn kaj minacis per striko. Estis pro tio eldonita arestordono je Krapková. Ŝi sukcesis forkuri en Slovakujon Hungarian kaj kaŝi sin tie. Tamen li finis la studojn kaj laboris kiel instruistino en Lom en Orlické-montaro. Tie ŝi varbadis laboristojn en teksaj fabrikoj kaj etajn kulturistojn por socialismaj ideoj. En la jaro 1891 ŝi aŭdis polajn studentojn kanti la "Ruĝan standardon". Ĝia melodio kaptadis korojn kaj rapide disvastiĝadis. Oni petis ŝin, knabinon 20-jaran, traduki la poemon en la ĉeĥan lingvon. Ŝi ne supozis tiam, kiom foje kaj kiel entuziasme ŝia teksto estos kantata. Ankaŭ kiam ŝi edziniĝis al instruisto Raichl, ŝi restis fidela kaj al Esperanto kaj al socialismo, kaj dum sia longa vivo si ĉiam aktive partoprenis en multaj okazoj celantaj plibonigi farton de homoj. Ŝi mortis 80-jara la 26-an de februaro 1951 en Náchod, vidvino de lernejestro.

Sed kazo de Běla Raichlová estas unusola. Ne estas troveblaj dokumentoj pri pluaj esperantistoj akiritaj por la movado pere de Lorenz-lernolibro, aŭ de lia agado. La broŝuro restis plejparte en stoko de la presejo. Kur kiam en 1900 Hoblík disvendadis sian stokon de malnoviĝintaj libroj, akiris tiuj broŝuroj legantojn, kiel ekz. min.

ESPERANTO de UEA n-ro 3 - marto 1961 alportis en la artikolo "Kultura agado" de Norman R. Smith jenan interesan sciigon:

"Grava tasko estas la konservo de alta nivelo de lingvo, internacia laŭ karaktero, Zamenhofa laŭ stilo, en akordo kun la Fundamento. - Nova kaj tre grava entrepreno estas la starigo de altnivela internacia ekzameno.

INTERNACIA EKZAMENA KOMISIONO. La Internacia Ekzamena Komisiono volas anonci, kiel rezulton de la unua ekzameno okazita dum la Brusela Kongreso, ke la unua "Internacia diplomo de la Internacia Lingvo Esperanto" estas akirita de D-ro A. Albault, Francujo. Ni volas gratuli lin je tiu sukceso."

En alia artikolo de la sama gazeto ni legas:

"Kiel konate, kunlaborantino de APO s-ino Haudebine gvidas kursojn de Esperanto en New Delhi, Hindujo. Dum sia restado tie ŝi daŭre serĉadas vojojn por kontakti kun diversaj instancoj. La unua firma paŝo fariĝis dank' al deziro de la klubo en Angers /Francujo/ efektiviĝi vesperon pri Hindujo pere de ŝia helpo. Tiel ŝi povis eniri Hindan Konsilantaron por Kulturaj Rilatoj, kie ŝi atingis la deziratan rezultadon, kaj tie vekis intereson pri nia afero." - ĉu ne estus eble organizi tian vesperon ĉe ni?

En la artikolo, sub la titolo "Al la tutmonda esperantistaro!", V.V.Molebnyj skribas:

"Laŭ informoj de gazetaro la Sovetaj junularaj organizaĵoj proponis aranĝi somere de la 1961-a jaro en Moskvo tutmondan Forumon de junularo.

La Kieva Junulara Esperanto-grupo "Amikeco" proponas al la plej vastaj tavoloj de esperantistaro subteni la ideojn de la Forumo. Ni alvokas internaciajn kaj naciajn esperantajn organizaĵojn sendi siajn delegitarojn aŭ apartajn reprezentantojn en kadroj de aliaj delegitaroj por partopreni la Forumon."

Ankoraŭ unu sciigo el la nomita gazeto: - En la Ŝtata Teatro de Zaraĉ en Lódz /Pollando/ okazas kurso de Esperanto por la geaktoroj. La kurso jam fariĝis klubo, kiu nomiĝas Esperanto-Klubo "Melpomeno".

ESPERANTAJ FLAGETOJ - 10 x 15 cm el silka materialo, tre belaj, taŭgaj por ornamo de tablo, montrokesteto ktp. - estas haveblaj ĉe nia klubo por Kčs 6,50 + sendkostoj. Mendojn direktu al Kluba biblioteko, Týnská strato 3, Praha 1.

La movado komencis efektive nur en jaro 1900, kiam Th. R. Čejka, instruisto en Bystřice p. H. eldonis sian unuan lernolibron enhavantan ankaŭ vortaron /kunlaborintoj V. Bilík, J. Holub, 188 paĝoj/. Baldaŭ trovis Čejka novan kunlaboranton, tre kompetentan pri ĉeĥa

lingvo, fakan instruiston Josef Krumpholc. Tiu helpadis lin en pluaj eldonoj. Ĉejka sciis organizi presadon kaj vendadon de siaj lernolibroj. Zorgis pri tre placa tipografia aranĝo. Aperadis pluaj eldonoj en diversaj ampleksoj. En la plej granda eldonnombro aperis Malgranda Lernolibro, 32-paĝa, tre bele aranĝita tipografie, vendata po 20 heleroj. Fina eldono de lia lernolibro estis la kvara aperinta en 1908, titolis "Úplná učebnice esperanta. Napsali Th. Ĉejka a J. Krumpholc. IV. vydání /doplňené/". Prezo 1,50 Kronoj. Bindita angle mole 2 Kronoj. Ĉejka eldonis ankaŭ grandformatan flugfolion "Esperanto sur unu folio", kies unu paĝo enhavis gramatikon kaj ĝeneralajn informojn, la dua vortaron de radikoj. Ĝi estis vendata po 2 heleroj.

Tia eldona agado de Ĉejka estis ebligata per ekzisto de organizado de esperantistoj, kiu komencis, samtempe kun la agado de Ĉejka, en Praha. Tiuj unuaj esperantistoj en Praha estis influitaj de agado el aliaj flankoj. Eduard Kühnl /naskita 1884/, studento de Teknika Altlernejo, invitadis en aŭtuno 1902 per afiŝeto sur nigra tabulo studenta en la vestiblo sur Karlovo nám. interesantojn pri Esperanto por anonci ĝin ĉe li "en desegna halo sur dua etaĝo, maŝinista fakultato". Mi anoncis min kaj eksciis de li, ke grupo de gesinjoroj intencas fondi esperantistan klubon, kaj mi varme aprobis tiun intencon. Mi baldaŭ konatiĝis kun pluaj junuloj decidiĝintaj aktivaj sur la nova kampo: La plej elstaraj inter ili estis Fr. Bárth /nask.1884/, komerca oficisto, kaj K. H. Bouška /naskiĝis 1884/.

14

VIRINO KUN KOFRO

Mi vidas ŝin kaj pensas: Damo.
Ŝi tras supren al la tramo
numero dekkvin. Laŭ la modo
ŝi kombis al si noblan nodon - -
Mi ankaŭ estis kiel pupo;
mi ne rapidis en okupon,
ne devis kuri post la pano.
Mi vidas sin kaj pensas: Damo.

Damo. Ŝi bone edziniĝis.
/Kaj kiom foje li feliĉis
havante „tian en la lito?/
Mi ankaŭ vestis nur kvaliton. Apud parulo kun titolo
ankaŭ mi ludis certan rolon.
Kaj al la homoj ĝi sufiĉis:
Damo. Ŝi bone edziniĝis.

Damo kaj tamen servistino.
Kun strangaj sentoj en animo
mi sekvas ŝin kaj kofron ŝian.
Simile vivis eĉ mi iam.
Eĉ mi, regule tro kompleza,
portadis ilin, ofte pezajn!
Eĉ mi klopodis ĝis la fino:
Damo kaj tamen servistino.

/Eli Urbanová: "Nur tri kolorojn"/

ĈEĤA PROLETA POETO KAJ ESPERANTO

Antaŭ nelonga tempo denove aperis en miniatura formato versoj de nia socialista poeto Jaroslav HOŘEJŠÍ. Lia unua kolekto aperis en la jaro 1921 sub la titolo "Muziko sur la placo".

Krom originala verkado li majstre tradukis multajn francajn poemojn kaj modernajn teatroludojn de francaj kaj hispanaj aŭtoroj. Krom tio li ankaŭ esperantigis poemojn de Vrchlický. Skribas pri tio nun lia frato, kies rememoroj estas publikigitaj en la gazeto "Svobodné Slovo" la 29-an de aprilo 1961.

1668- DA E-ELSENDOJ EN LA JAKO 1960

Laŭ la statistiko, kiun havis sinjoro G. Langlantier, kunlaboranto de CED, pri la radio. En la jaro 1960 22 radiostacioj de 13 landoj elsendis entute 1668 programojn en Esperanto. Temas nur pri radiostacioj, kiuj elsendas regulajn programojn en la internacia Lingvo.

ATENTIGO PRI S E T

Denove ni atentigas ĉiujn gesamideanojn, kiuj interesiĝas pri SOMERA ESPERANTO-TENDARO, ke ĝi okazos en du etapoj: de 16.-29.7. la unua etapo. de 30.7.-12.8.1961 la dua. En la tendaro antaŭtagmeze oni instruos, posttagmezo estos dediĉita al memlernado kaj ripozo. Krom tio oni aranĝos ekskursojn al belega cirkaŭaĵo. La tuta restado en 14-taga kurso kostos Kčs 250,-. La sumon oni devas pagi 14 tagojn antaŭ komenco de la kurso. La aliĝilojn sendu, samtempe kun antaŭpago Kčs 100,-, ĝis la 15-a de junio 1961, por ke vi povu ricevi 50%-an fervojrabaton.

Aliĝu senprokraste je la adreso: "Okresní dům osvěty, odbor Esperanto, Třebíč".

DUA OFICIALA INSTRUADO POR FUNKCIULOJ DE ESPERANTO-RONDETOJ EN ĈSSR

De la 24-a ĝis la 27-a de junio 1961 Osvětový ústav v Praze /Kleriga instituto en Praha/, komisiita de Ministerio de instruado kaj kulturo, aranĝas en hotelo Solárka ĉe Frýdlant nad Ostravicí la duan /post Štířín/ oficialan instruadon por funkciuloj de E-rondetoj kaj E-instruistoj.

En la programo estas prelegoj de d-ro Jermář, prezidanto de ĈSEK, plue de gvidanta oficistino de la ministerio k-dino J. Bukačová kaj de estrino de eksterlanda sekcio en la ministerio k-dino dr. E. Carnimeová.

La instruado estas por Ja invititoj senpaga, inkluzive vojaĝon. manĝaĵon kaj loĝadon.

ESPERANTAĴOJ ELDONATAJ DUM JUNIO 1961

Longe atendita Esperanto-lernolibro de Th. Kilián aperos fine de junio aŭ oamence de julio en Ŝtata pedagogia eldonejo. Ĝi kostos bindita Kčs 12,10. Pro limigita eldonkvanto ni rekomendas al niaj legantoj mendi aŭ aĉeti ĝin senprokraste pere de la rondetoj.

EN JUNIO ESTOS ANKAŬ LIVERATA "GVIDLIBRO—PRAHA".

LA POŝVORTARO DE RUD. HROMADA APEROS POST LIBERTEMPA SEZONO, ANKORAŬ DUM LA JARO 1961.

15

En lasta momento atingis nin malĝoja sciigo pri forpaso de nia fervora samideano, la intendanto-generalo unuaklasa LOUIS BASTIEN, komandanto de Honora Legio, honora prezidanto de UEA. Li mortis la 10-an de aprilo en sia hejmo en Parizo, 91-jara.

Louis Bastien naskiĝis la 21-an de decembro 1869 en Obernal apud Ŝtrasburgo. Li esperantiĝis en jaro 1902. En la Esperanto-movado franca kaj tutmonda li okupis gvidajn postenojn. Dum malfacile periodo li direktis la ŝipon de IEL-UEA kiel ĝia prezidanto sekure al pli prospera estonteco. Li estis aŭtoro de bonega "Naŭlingva Etimologia Leksikono" kaj de aliaj verkoj kaj li kunlaboris ĉe la Enciklopedio de Esperanto.

La tuta esperantistaro konservas al li honoran rememoron.

VIZITIS NIM EKSTERLANDAJ GESAMIDEANOJ

En Bulteno n-ro 56 aperis duonjara raporto pri agado de EKP. Krom tio nia klubo dank' al sia geografia situo havas ofte plezuron akcepti gastojn el eksterlando. Jen konciza listo pri tiuspeca trafiko en nia klubejo dum kelke da monatoj:

2. 7.1960 JAQUELINE BEASLEI, Anglujo; 5. 7.1960 ISTVAN BANÁTI, Hungarujo;
21. 7.1960 JULIO kaj PAULA LIEBLING, Belgio;
28. 7.1960 THEO ROS, Holando; COR de WAART kun edzino, Holando;
12. 8.1960 Grupo da hungaraj gesamideanoj el Budapest kaj Miskolc;
7. 9.1960 THÓRBERGUH THORDARSON, Islando;
FRANC0 GALBUTERA, Italujo;
25. 9.1960 D-ro ADOLF HALBEDL, Austrujo;
19.10.1960 SOILE LINGMAN, Svedlo;
3.11.1960 SIMEON HESAPĈIEV, Bulgario;
18.11.1960 MARIA DOBROWOLSKA, Pollando;
10. 3.1961 L. R. ESCARTIN, Hispanujo;
MARGARETA PETENDI, Hungario;
3. 4.1961 JOHS. VESTERLAND-ANDERSEN, Danujo;
7. 5.1961 D-ro HANS GROH kun edzino, Orienta Germanujo;
10. 5.1961 EDMUND FETHKE, Pollando;
15. 5.1961 MIHO MINKON TOTKOV, Bulgarujo;
21. 5.1961 NORMAN A. COLLIER, Australio.

Kompilis Anna Bárochová

VI SKRIBAS - NI RESPONDAS

RHODESIO - NJASALANDO

S-ano W. BICKLEY skribas al ni aerletere: "Dum kelke da jaroj mi ricevas kun plezuro vian bonegan Bultenon. Miaj devoj necesigas min multe vojagi kaj estas interese legi viajn artikolojn dum mi restadas en la trankviligaj arbaroj. Estas granda malkontentigo nuntempe en Afriko. Tion vi ja scias!" Ni kore dankas pro la bela letero: Kara s-ano, vi ne bezonas reciproki nian Bultenon. La fakto, ke ankaŭ en tia ekzotika lando nia modesta gazeto estas kun intereso legata, estas por ni plej bela rekompenco.

S-ano Lászlo TOLNAI, Hungario - ni dankas por via invito, kiun ni iau eblo uzos. Same ni petas vian viziton, kiam vi venos al Praha. Al minista E-grupo ni deziras sukceon.

S-ino Blanka DEVĈIĈ, Jugoslavio - ni ĝoĝas, ke la anonco en nia "Bulteno" havis sukceson. Skribu pri viaj sukcesoj ĉe infanoj en E-kurso.

S-ano Johann ESSL, Tallin, USSR - dankon por viaj poemoj, kiujn ni utiligos en klubaj kunvenoj. En tiu ĉi "Bulteno" ni repregas nun aktualan poemon pri kosmonauto Gagarin, kiu vizitis nian landon la 28-an gis la 29-an de aprilo 1961. En Praha li estis tre koĥe salutita.

S-ano Petar ZAKULA, Jugoslavio - reciprokan saluton al vi kaj al via fratino.

S-ano Serggj SADOVOJ, Astrahan, USSR - vian poŝtkarton ni ricevis. Dankon.

BULGARIO

= IVAN ASTARGĈIEV, Gabrovo, "Ĉerkovna" l, Bulgario, dez. kor. kun la tuta mondo kaj interŝanĝi PK.

ĈEĤOSLOVAKIO:

= LADA BALA, Havlíčkova.688, Moravské Budějovice, dez.kor.kun ĉ.l. kaj interŝanĝi aluemetikedojn kaj PI.

ĈINIO:

= Prof. IO CHOU, Nord-okcidenta Kolegio de Agrikulturado, WÚkong, Shensi, Ĉinio, dez.koresp.por kolekti:1.PM-ajn komplet-seriojn de Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando, Rumanujo, Bulgario kaj Dem. Germanio /post liberigo/.2.PM-ojn pri fauno, plantaro, nacia kostumo kaj Esp. /en serio/devc.l. redonas egal-valorajn PM-ojn aŭ aliajn aĵojn laŭ deziro de korespondanto.

DANUJO :

= P. CH. GAARDE, Ulkebol Kirke, pr. Sonderborg, Danujo, kolombredisto dez.kor. kun samfakuloj el Ĉeĥoslovakujo.

FINLANDO :

-- JUHANI KIVILUOTO, Kajaani, Box 16, Finnlando, dez.kor.kun ĉinaj kaj vietnamaj gesamideanoj.

HUNGARIO:

= ERNESTO LADMANN, Bocskai sor.No 162, Esztergomtábor, Komárom.m., 29-jara mi-
neja elektromuntisto dez.kor, kaj interŝanĝi PI kaj esperantaĵojn.

POLLANDO :

= Cent Vroclavaj gejunuloj dez.korespondi kun socialismaj landoj. Skribu amase al: PÓLA
ESPERANTO-JUNULARO, Rondo en Vroclavo, Wrocław, str.Dubois 3, Pollando.

= DENKOWSKI FRANCISZEK, Katowice 16 - Janow.ul.Zielona 3,Pollando, dez.kor. kaj
inters.il.revuojn tutmonde.

RUMANUJO:

= GHITA MARIN, urbo Braila, str.Golesti 1, Rumanujo, 27-jara oficisto dez. interŝanĝi
BK,esp.-revuojn, filmrevuojn, PM kaj koresp. pri turismo.

En Amsterdam mortis la 7-an de majo fervora esperantistino s-ino E. FAULHABER-
CÍZKOVSKÁ, kiu multe kunla- boris en la iama Rondeto de esperant- istinoj en Praha.

Fariginte edzino de s-ano F. Fgulhaber, Akademiano en Amsterdam, si multe kontribuis sur
Es- peranto-kampo, preoipe kiel redaktor- ino de La Vojo, konata porinfana gazeto de nia
junularo.

SOVETUNIO:

= SVI LELL, s-ino, Sade tn.l krt.l Tallin, Estonskaja SSR, dez. kor.

= TRIGULOV IBRAHIM RAĤIMOVIĈ,ul.Sadovaja 23,Severny Nurlaty, Tatarska ASSR kor.
,inters.L, PI ,PM, liistr. gazetojn, almetetikedojn kun ĉiuj landoj.

= GORAZEEV.VLADIMÍR, Opitnij uóastok, Abomeg.jascik N 25,Magadan, dez.kor.,
inters.PM.PI kaj almetetikedojn.

= KIVAJEV JURU, 24-jara stud., str. Arcibeŝevskaj.171,k.222,Kujbiŝev,U3SR dez. kor.kun
o.l.pri muziko kaj arto.

= ANDREJ SIDGROV, ul. B. Chmelnickogo 10.Ĉerkassy/obl./, USSR, pri traduko
ruslingven, dez.ricevi skizojn.novelojn esperantigitajn el nacia literaturo pri lavtemoj: 1.
Patrina amo /el vivo homa aŭ besta/; 2. Amikoj de la homo el besta mondo/pri hundoj, aliaj
bestoj,birdoj/;3.ĉasado, fiŝkaptado.

= ARTURS KUBULNIEKS, s.n.Vecogre, Ogres 7-g, ŝkola, Latvia SSR, 37-jara instru-
isto,inters.amatorajn fotografajojn.

= VALENTIN A.MELNIĈUK.poŝtrestante Do vostrebovanija, Lvov 5, USSR, 24-jara
studento de medicino dez .kor. pri .gaz- muziko,modernaj dancoj kaj inters.BK, muziknotojn,
esp.kaj gliajn gazetojn, revuojn, librojn kun oiuj landoj.

= LAINA POŠKA,Vilnius 13,Smlno 26-15 Litova SSR, f-ino,dez.int'ers.PM.

= Klubanoj de ESPERANTO-SEKCIO de

Centra Kulturdomo de medicinistoj, Strato de Gercen 19, Moskvo K-9,USSR, =

KOŝELENKO OLGA ALEKSEEVNA kaj KAN- DIBA VALERIJA ALEKSEEVNA, ul.
Novovo- Sarnaja No.2, Jalta,Krym,Sovetio, am- bau .komencantinoj dezirag korespondi
ankaŭ kun komencantoj el c.l.

BULTENO, informilo de Esperantista Klubo en Praha ĉe Kulturcentro de ONV Praha
l.Eldonas: Kultura kaj societa centro de ONV-1. Ĉefredaktoro: J.M. Havlík, Fr. Křížka 12,
Praha 7, tel.73637.

Administrejo: Týnská ulice 3, Praha 1,Staré Město.